

La Karavelo

internacia kultura magazino en esperanto



A
LUIS LAZARO
ZAMENHOF
1859 - 1917
NO ANO DO CENTENÁRIO
DO
ESPERANTO

12 - 4 - 1987



Preferinde kontaktu La Karavelon ĉe
lakaravelo@gmail.com

Adreso

Dr. João José Santos
Rua Damasceno Monteiro, 21-B, r/c dto.
1170-109 Lisboa – Portugal

Telefono (+351) 218 127 801

Fakso (+351) 218 127 801

(nepre telefonu antaŭe)

PoŝTel. (+351) 960 131 515

www.lakaravelo.com

ISSN (papera): 1647-6980

ISSN (DVD): 1647-6999

ISSN (reta): 1647-3353

Leĝa Depono en
"Biblioteca Nacional de Portugal"
301472/09

Papera versio:

ĉiu revuo: 8 € + sendokostoj

jara abono (6 revuoj): 48 €

(LK donacas la sendokostojn)

Pdf-versio (neprintebla):

ĉiu pdf-dosiero: 3 €

jara abono (6 pdf-oj): 12 €

nepre konsultu la LK-Katalogon ĉe
www.lakaravelo.com

libera softvaro
© João José M. Q. dos Santos

Konstantaj Kunlaborantoj

Konstantaj verkistoj...

Djalma Pessata (Brazilo)
Eduardo Novembro (Portugalio)
Edward Jaśkiewicz (Pollando)
Geraldo Mattos (Brazilo)
Gerrit Berveling (Nederlando)
João José Santos (Portugalio)
Leo De Cooman (Belgio)
Luiza Carol (Israelo)
Nikolaj Neĉaev (Rusio)
Roberto Ribeiro (Brazilo)
Roger Gotardi (Brazilo)
Tibor J. Szabadi (Hungario)
Valentin Melnikov (Rusio)

Revizias kaj kunhelpas

Cindy McKee (Usono)
Kurt Fischer (Germanio)
Luiza Carol (Israelo)
Roger Gotardi (Brazilo)
Túlio Flores (Brazilo)
Valentin Melnikov (Rusio)

Direktas, redaktas, kompostas

João José Santos (Portugalio)

Enhavtabelo

1	Kovrilo: Statuo al Esperanto - Portugalio, Bareiro, Placeto Zamenhof (foto de JJS)	Redaktejo
2	Enhavo – Kolofono	Redaktejo
3	Pri la libro de Miguel Boieiro: La plantoj, niaj fratinoj	João José Santos
4-5	Ĉefartikolo: Patriamo	João José Santos
6	Poezio - Fernando Pessoa Mesaço (poemoj: 41-42-43)	João José Santos
7	Poemoj diversaj Neĉaev, Carol kaj Santos poetumas	Nikolaj Neĉaev Luiza Carol João José Santos
8-9	Poezio el la latina - Josef Rumler Elegio Praga	Gerrit Berveling
10-13	Historio: Emile De Cooman La evoluo (2-a parto)	Leo De Cooman
14-15	Historio: Iam en Portugalio... (1) Legendo de Egas Moniz	Eduardo Novembro
16-17	Historia Kroniko: Esperanto en Portugalio Bareiro - la portugala esperanto-urbo	João José Santos
18-19	Historia Kroniko: Esperanto en Portugalio Bareiro pluestas la plej grava esperanto-centro en Portugalio	João José Santos
20	Rakonto: Artur Azevedo La kukolhorloĝo	Roger Gotardi
21-23	Historio: Universalaj Kongresoj de Esperanto 12-a (1920) - 13-a (1921) - 14-a (1922)	Djalma Pessata
24	Rusa recepto: Pilafo de legomoj	Irina Mironova



La Karavelo


esperanto-editejo

Informoj pri La Karavelo

Informiĝu per la LK-Katalogo el www.lakaravelo.com
Se vi plu havas dubojn, skribu al lakaravelo@gmail.com

Subteno de La Karavelo

Jen kiel vi povas subteni La Karavelon:
Abonu ĝin. – Aĉetu ĝiajn librojn. – Diskonigu ĝin.
Donacu varojn el La Karavelo.
Skribu aŭ vizitu niajn anoncantojn gratulante ilin
pri anoncado sur niaj paĝoj.



La plantoj, niaj fratinoj

João José Santos
teksto kaj fotoj

En la 1-a de aŭgusto 2010, la urbodomo de Alkoŝeto¹ malfermis sian noblan salondon al la prezento de portugallingva libro: *La plantoj, niaj fratinoj* (portugale: *As plantas, nossas irmãs*). Ĝia aŭtoro estas la esperantisto Miguel Boieiro.

La libro estas beleaga. La bindo dura kaj rezistiva, presita en duonbrila kuŝepapero adekvata al la belegaj bildoj de plantoj, kiuj riĉigas la libron. La libro prezentas 92 diversajn plantojn, ekzistantajn en la portugalia flaŭro. Sub la ĝenerala nomo "plantoj", aperas arboj, arbustoj, floroj, ktp. Ĉiu planto okupas ĝuste du paĝojn, la paran kaj neparan, tiel ke malfermante la libron oni samtempe vidas la tutan artikolon de iu planto. En la para (do maldekstra) paĝo aperas bildo, ofte skema, de la pritraktata planto, en la nepara (do dekstra) paĝo aperas foto de la planto. Boieiro ne perdus tempon kun rokokaj ornamoj. Lia stilo estas rekta, simpla, gracia, imitanta la plantojn, kiujn li pritraktas. Ofte li aludas al historiaĵo, priskribas la planton, preksribas sanigan recepton, montras gastronomian aplikon, laŭ flua maniero, kvazaŭ li agrable parolus kun la leganto.

En la komenco de la Prefaco, verkita de Carlos Campos Ventura, direktoro de *Instituto Hipokrato de Instruado kaj Scienco* (www.institutohipocrates.pt), oni povas legi:

Dum sia vivo, Miguel Boieiro ĉiam strebis en diversaj agadoj, atingante responsajn kaj elstarajn postenojn. Io ligas tiujn diversajn agadojn: la servo al la komunumoj, kio envolvus lin en laboroj celantaj la plibonigon de la Homaro kaj de la Homa Estulo. Dum 19 jaroj li estis prezidanto de la Urbodomo de Alkoŝeto (1983-2001), tuj poste li estiĝis skabeno, kaj ekde 2005 ĝis nun li estas prezidanto de ĝia Municipa Asembleo. Tian postenon li jam havis antaŭe en la Urbodomo de Sejŝalo², de 1980 ĝis 1982.

Li estas entuziasmulo pri Esperanto, la lingvo de la universala kompreno. Esperanto ĉiam kaptis la simpatian de manlaboristaj organizoj, anarkismo-sindikalistaj, internaciistaj kaj politike maldekstraj. Aliflanke ankaŭ la naturisma movado ĉiam simpatiis al esperanto. Miguel Boieiro, ekde 2002 partoprenas en naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj de Esperanto, starigas esperanto-lernogrupejn, instruas, lernas...

Kiel vidite, Boieiro ne kaŝas esperanton, sed li ankaŭ ne svingas neadekvate ĝian flagon. Esperanto aperas en la Prefaco de ĉi tiu libro, laŭ natura maniero, ĉar ĝi ankaŭ apartenas al la vivo de la aŭtoro. Se ĉiu esperantisto uzus normale esperanton en sia vivo, nia lingvo jam estus enradikiĝinta en la socio.

La traduko de *La plantoj, niaj fratinoj* en esperanton riĉigus nian lingvon kaj bibliografion. En Portugalio ekzistas esperantistoj kun fakaj scioj pri plantonomoj. Ili povus helpi la aŭtoron en la traduko.



La aspekto de la tuta libro estas ĉi tia.



Miguel Boieiro dediĉas ekzempleron al sia amiko João José Santos.



Plena salono.



Boieiro kaj Santos interparolas.

1 Alkoŝeto (portugale *Alcochete*): eta kaj ĉarma urbo en la maldekstra flanko de la rivero Taĵo, do en la suda flanko. Ĝi situas proksime de Lisbono. La portugalaĵ esperantistoj jam dufoje faris sian nacian renkontiĝon en Alkoŝeto.

2 Sejŝalo (portugale *Seixal*): urbo proksima de Alkoŝeto.



João José Santos

joaojosesantos@gmail.com

Patriamo

Patriotismo mi nomas la servadon al la bono de ĉiuj miaj samhejmanoj, kian ajn devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas. La servadon speciale al la interesoj de unu gento aŭ la malamon kontraŭ alihejmuloj mi neniam devas nomi patriotismo. Mi konscias, ke profunda amo al sia patrujo kaj al sia hejmo estas afero tute natura kaj komuna al ĉiuj homoj, kaj nur nenormalaj eksteraj cirkonstancoj povas paralizi tiun tute naturan senton.

Ludoviko Lazaro Zamenhof
en Deklaracio pri homaranismo (1913)

Prologo

Kelkaj esperantistoj pretendas, ke deca esperantisto ne devas ami sian patrimon, sian landon, sed nur la tutan mondon, ĉar laŭ ili, patriamo dividas la homaron enkondukante ksenofobion.

Celas ĉi tiu artikolo montri, ke patriamo:

1. ne estas ksenofobio;
2. ne kondukas al ksenofobio;
3. estas kontraŭa al ksenofobio;
4. kondukas la homon al la universala amo al ĉiuj homoj kaj popoloj;
5. estas natura sento;
6. estas necesa al la identiĝo de ĉiu homo.

Tamen, kara leganto, plaĉas al mi ĉi tion montri per maniero pli leĝera ol fasko da argumentoj.

Ho!, la malfacila vivo de bebo!

Ĉu li ploras, ĉar li vidas, ke la patro alvenas hejmen tre laca kaj plena je nesolveblaj problemoj? Ĉu li ploras, ĉar al la patrino ankoraŭ doloras pro la akuŝo? Ne, tute ne. Li ploras por peti komforton, ĉar iu vestaĵo tiklas lin. Li ploras por sin savi, ĉar li sin vidis en stranga pozicio post falo. Li ploras por nutrado, ĉar li volas pluvivi...

Bebo centrigas sian tutan atenton en si mem. Li amas, sed ne pro altruisma teniĝo. Li kaptas la amon de la aliaj, ĉar li mem bezonas amon. La principo de bezono regas lin. **Ivano amas sin mem.**

Tre rapide - oni povas diri "fulmrapide" - li lernas la plej bazajn regulojn de la interhoma rilato. Li ridetas por ke oni ridetu al li. Li amas ĉar li bezonas amon. Li lernas doni al la frato, ĉar li bezonas, ke la frato donu al li. **Ivano lernis negoci.** Intertempe, tiu bebo enmetis en sian mondon la patrimon, la patron, la gefratojn, la geavojn kaj ĝenerale la homojn, kiujn li kontaktas, kvazaŭ li estus alpropriginta al si sian konatan mondon. **Ivano plu amas sin, sed nun li, kiel estulo, estas multe pli granda, ĉar en li ne plu vivas nur li mem, sed lia mondo, kiun li amas, ĉar lia mondo estas li kaj la ekstera mondo, kiu havas perceptan kaj sentan reprezenton ene de li.**

Racia animalo

Ivano estas nun knabeto. Li perfekte regas sian etnan lingvon, kiu estas por li la "normala lingvo". Ĉiuj aliaj lingvoj montriĝas strangaj por li. Lia mondo estas la "normala", kaj ĉio kio distiĝas de tiu mondo ŝajnas al Ivano malbela, stranga, nenormala kaj kelkfoje eĉ malnormala. La naturo estas plenscia. Ĝi protektas Ivanon kontraŭ dispersoniĝo, kontraŭ disetniĝo, kio estus finfine la elimino de la estulo, lia morto kultura kaj eble fizika. La patrino Naturo estas saĝa kaj ĝi donas ĉion. Ĝi donas eĉ laŭŝajne kontraŭajn lecionojn, kiuj ne sin maligas, sed sin kompletigas.

Ĉiuj kolegoj de Ivano estas blankuloj, kiel li mem. Kelkaj estas bluokulaj, aliaj brunokulaj, aliaj verdokulaj kaj aliaj nigrookulaj. Kelkaj el la kolegoj havas haŭton pli helan ol aliaj.

Ivano jam estis vidinta per la televido kaj surstrate, ke kelkaj homoj havas nigran haŭton, sed li neniam estis pensinta pri la afero, kaj li neniam estis koninta homon kun

tiel kolora haŭto. Do la afero ne tuŝis lin. Tiu afero apenaŭ apartenis al lia mondo.

Aperas nova kolego en la klaso. Li estas Marko. La nova kolego havas tre malhelan haŭton. Neniu volis ludi kun Marko, en la unua tago. Iom post iom ĉiuj vidas, ke Marko lernas tiel bone kiel la aliaj, kaj ke li estas ĝentila knabo, kun virtoj kaj malvirtoj similaj al la aliaj geknaboj. La instruisto helpas la patrinon Naturo. Naturo jam estis instruanta ĉiujn, ke haŭtokoloro havas nenian signifon, sed la finfinan lecionon donas la instruisto, kiu saĝe montras en la praktiko, ke la eksteraj diferencoj nepre ne montras karakterajn diferencojn.

Ivano lernas do, ke aliaj homoj, malsamaj al li mem en eksterajoj, finfine estas egalaj al li. Jes, ankaŭ Marko terure malsatas antaŭ la tagmanĝo. Ankaŭ li enpasiigis al knabino, kaj ankaŭ li havas patrinon, kiu ameme lin prenas en la fino de la lernotago.

Ni, la plej bona popolo

Ivano amas historion, precipe la historion de sia lando. Tiaj bataloj kaj reĝoj, tiaj agoj memoferaĵoj por la patrio, la heroaj ekzemploj, bolas en lia kapo. Li fieras, ke ankaŭ li estas ido de tiel enorma gento.

En la estulo Ivano ne plu estas nur li mem, liaj familianoj kaj amikoj, lia domo kaj la lernejo. Nun lia identeco akaparas ĉiujn liajn landanojn, ne nur la nunajn, sed ĉiujn, kiuj jam vivis. En si mem estas la folkloro de lia popolo, la monumentoj, la historio kaj... jen la verkistoj kiuj evoluigis tiel bele sian lingvon al altgrada nivelo de abstrakto kaj raveco.

Ivano estas nun vera patriamanto. Lia koro flamas, kiam lia futbala selektitaro ludas, kaj li ĉiam trovas ekskuzojn, kiam ĝi malvenkas.

La bebo estas nun studento

En la fakultato, Ivano konas belan knabinon. Ĉu eblas, ke ŝi estus malbela? Tute ne. Mi ne difektus mian propran inventitan rakonton. La princinoj ĉiam devas esti belaj; nur la princoj rajtas esti malbelaj. Nu, estis mi diranta, ke Ivano ekkonas belan koleginon en la fakultato. Ho, ŝi ne estis lia samlandano. Ŝia lando estis ĝuste tiu, kontraŭ kiu la prapatroj de Ivano kontraŭbatalis. Ili parolas multe, ho jes! Ĉiu el ili rakontas la historion de sia lando laŭ sia maniero, kaj ili ofte ekdisputetas. Tamen, ili ekkomprenas ion tre valoran. Ĉiu el ili komprenas nun, ke la aliulo amas sian landon sammaniere. Tio estas natura. Ne sencus, ke homo pensus, ke la alia ne amas sian patrinon. Finfine, *ĉiuj homoj estas egalaj*, pensis Ivano. Ĉiuj amas siajn familianojn,



Ĉiu homo estas galaksio evoluanta el kerno eksteren por la kompreno de sia universo vastiĝanta pli kaj pli.

amikojn, sian landon, siajn kutimojn kaj morojn. Do, kial oni ne respektu tion ĉe la aliaj homoj? Nur tiel, ni povas postuli, ke oni respektu nin mem kaj niajn sentojn.

La patriamo de Ivano ne finiĝis, neniam finiĝis, neniam finiĝos. Ĝi tutmondiĝis en universalan komprenon, kiu ampleksigis lian koron ĝis la grandeco de nia planedo.

Oni ja ne povas ami la aliajn homojn, se oni ne amas sin mem. Oni ne povas ami la aliajn landojn, se oni ne amas la sian.

* * *

Epilogo

Leĝere la afero estis prezentata, sed facile oni komprenas, ke ĉiu el ni evoluas en spiralo, amante unue sin mem, kaj iom post iom oni konkeras la mondon per kompreno kiu kondukas la homon al sentoj kiuj universaligas. Tio estas la spirala evoluo de la memamo al la universala amo.

Kompreneble, la advokatoj de la komplikigo relativigos ĉion, dirante ke ne nur tiu teorio ekzistas. Tiam ili renversas la plej bonajn sentojn, kraĉante sur ilin, nomante patriamon ŝovinismo, ne komprenante ke la patriamo estas ĝuste la forto kapabla konstrui la universalan amon. Malamo nur povas konstrui malamon, kaj neamo nur neamon.

Tamen, ne por tiuj skribas ĉi tiu redaktisto.

★

www.lakaravelo.com



Mesaô

de Fernando Pesoo

João José Santos

trad. el la portugala

TRIA PARTO – 3: LA TEMPOJ – 2-A: ŜTORMO

En marabismo, kio kuŝas sin levante?
Portugali', ni, l' estopovo.
Kia moviĝo el la fundo nin eklevas?
La dezir' al la volopovo.

Kaj kuŝas la mister', ke l' nokto estas splendo...
Subite, kie roras vento,
la fulmo, la lumturo de Di', spire brilas,
kaj la tenebra maro tondras.

TRIA PARTO – 3: LA TEMPOJ – 3-A: KALMO

Kiun marbordon la ondoj
kantas, kiu netroveblas
eĉ per mil navoj sur maro?
Kion altrovas la ondoj
kaj neniam ekaperas?
El kie venas ĉi-sono
de la alplaĝanta maro?

Fora insul' kaj proksima,
Kiu en otoj persistas,
por la vido ne ekzistas.
Kiu nav', ŝipar' aŭ floto
povas vojon trovi plaĝen
kie la maro insistas,
se ĉe la maro ĝi solas?

Ĉu estas en spaco ŝiroj
por vido al flank' alia?
Kaj se ŝir' estos trovita,
ĉu kaŝa insul' aperos
ĉi tie kie sargasas?
Ĉu la fortuna land', kiu
gardas l' ekzilitan Reĝon
en sia vivo sorĉita?

TRIA PARTO – 3: LA TEMPOJ – 4-A: FRUMATENO

La monstro, kiu kuŝas en marfino,
el la tenebroj venis traserĉante
la frumatenon de la nova tago,
de la tag' nova, kiu ne finiĝas.
Li diris: "Kiu dormas memorante,
ke li malkovris jam la Duan Mondon,
sen la dezir' la Trian malvuali?"

Pro lia turno, en tenebro, l' sono
la dormon mavas, tristas la sonĝado;
turne foriĝis la monstro serveca,
kiu sinjoron sian venis preni
kaj ĉi tie sinjoron sian voki.
Li venis voki al Tiu dormanta,
al iama Sinjoro de la Maro.





Nikolaj Nečâev

REKVIEMO

En septembro regas temo:
 Folifala rekviemo
 Pri somero, varmo, suno,
 Pri knabaĝo, mia junio.
 Rekviemo folifale
 Proksimigas min fatale
 Al neĝeroj, al decembro,
 Al minora blanka tembro.

TAPETO

Septembro per flavaj folioj tapetas
 Jen grizan asfalton, jen nigran de ter'.
 Sed vento konstante petolon ripetas:
 L' tapeton forpelas al blua aer'.



Luiza Carol

CEPO

Dum la infaneco, mi opiniis
 ke la cepo surmetas ĉemizojn de aĝo
 unu sur la alian.
 Mi opiniis, ke ĝi neniam demetas
 malnovajn ĉemizojn,
 sed nur surmetas novajn.
 Mi opiniis, ke ĝi varmigas pli kaj pli
 ĝian verdan koron de juneco.

Nun mi scias, ke mi malpravis.
 Nun mi scias, ke la cepo kreskas
 de ene eksteren.
 Ĝia juneco maljuniĝas,
 maldikiĝas pli kaj pli
 envolvante ĝin kvazaŭ en pluvmantelon,
 dum ĝia maljuneco elkreskas freŝverda
 el ĝia verda koro. *

* Pri maljuniĝo legu ankaŭ la poemon *La homa vintro*, de João José Santos, en LK-10, p.9.



João José Santos

PEGAZO ¹

Lacigis la montaron la flugoj de l' agloj,
 en akvo verdis l' arboj viziopoetaj
 fortike svagaj... estis profetoj de l' lagoj.
 Kuradis la ĉevalo, flugila... vagema...

Jam brilis ĉe fortviglaj pitiaj flugiloj
 la rev' kreiva... la estonteco de l' nuno...
 la rev' pandora kaj la vidmediumeco.
 Trotadis la ĉevalo, pacblanka... vagema...

Enhavis ĝi en kor' la veluran liberon,
 ĉe flugo la sopiro estiĝi eterna.
 Flugadis la ĉevalo, leĝera... vagema...

Ĝi serĉis transon... la revon, eĉ pli reala
 ol sensacioj, la flugil' de l' poezio!
 Pensadis la ĉevalo, ankoraŭ... vagema...



1 Aleksandraj versoj. En ĉi tiu poemo, oni uzis la metrikon 2-4-6-9-12 por krei pli longan ritmon ol se ĝi estus 2-4-6-8-10-12. Tiu ritmo pli alĝustigis al la lanta trotado de ĉevalo, aŭ al la lanta ritmo de aglaj flugiloj. Ĉi tiu poemo estas unu el la 50 aperontaj en la poemverko *Nek Titano Nek Apolo*, kiu estas dulingva verko, esperanta kaj portugala.



Gerrit Berveling

trad. el la Latina



Josef Rumler (1922-1999)

estis Ĉeĥo. Li laboris kiel poeto, redaktoro ĉe eldonejo kaj literatura kritikisto. Aperis de li pluraj poemoj Ĉeĥe, ankaŭ en Esperanto. Plej fama estas internacie lia *Lasta Ĉevalo* (Fonto 1992). Li sporade verkis eĉ Latine.

Elegio Praga¹

de Josef Rumler

Al Jaroslav Seifert

En ĉi lando – maro prae – kiun tempo dorlotis
kaj homo (tial ĝi ŝanĝiĝis en ĝardenon)
ankras la kastelŝipo en la centro
firme ligita je la ŝnuro de l' historio
kiel fiera besto sfinkso dresita.
Jen kunkreskaĵo de kulturoj eminenta
sube la urbo la rivero la fumo – kaj ni.
Ni plebo Ni rustika pajlo Ni desube
de ĉie ni kun-kuras kun-sturmas
en ĉi urbon kiu kiel ĉiu urbo
estas kunfluejo ve! samkiel kloako.
Luno iras kun Mácha superurbe
agordante instrumentojn por geamantoj

Prago Vi dolĉa Ĉu dolĉa? Male amara ...

Vi urbo de niaj infanaĝaj amhistorioj
dumlernejaj – unue – nur provade
nur tiel – tio estas ĝisfine
kiam en la vivo mispaŝo ne validas

En ĉi urbo vivas pli olda kamarado
Birdo Poeto Siamomente kantas
Fojfoje flugilon laman eĉ movas

¹ Tiun ĉi poemon tradukis Gerrit Berveling el la Latina; Josef Rumler mem faris sian propran tradukon en Esperanto. Baldaŭ aperos - paralele en la Latina kaj en Esperanto - ĉe eldonejo Fonto, *Renovigitaj bildoj de la kampara vivado en Ĉeĥio*. La originalon verkis Rumler Ĉeĥe; la dulingvan tradukon faris la poeto mem. Editoris Gerrit Berveling. (GB)

Kiam super Žižkov la sundisko leviĝas
salutas la birdo la neston de sia unua plumo
Kaj sekvas la tago – tiu arkaĵo baroka
ĉe kies fino forglitas la ruĝa disko
jen post Ladronka – apude al la loĝejo
de nia emerita rezistema poeto
Kaj vesperiĝas Baldaŭ jam surĉiele
por paŝti sin la stelo-kokinoj alvenas

Prago amara urbo vi de tiom multe
da turoj da pontoj da sanktuloj dubindaj:
kion ni scias vere pri ili kion pri ni mem
ni formiketoj subkastela profanula vulgare

Vi urbo kiel vi fartas? – per turpintoj
tiklante la dolĉetan ĉielon de l' patrujo
ĉielon ĉi falsan kiun pendigis super vi
la fatala misfortuno de nia eteco

Luno de Mácha silentas superurbe ...
Tiel diru do, diru do vi Prago acerba
kial tiom da amo ve! disfloras ĉe ni
el tomboj kial tomboj vivas pro tiu amo?
Kial la homo dumvive foje fariĝas tombo...

Tamen ĉu ĉielon vere ni sopiras? Sinjoro...
Inferon prefere anstataŭ pacigilo
Kun la Diablo kunligite bruegadi
prefere ol senŝonaj ruĝiĝi kune kun anĝeloj

Prago acerba, ho vi urbo flegma apatia
Etoŝe tamen nur en tio speciala:
Kio jam hodiaŭ da poeta gento
en ĉi spacoj da lingvo viapavime resonanta
sian ĉaron ektiras? Tiel estas en nia fatalo
decidite ĉi tie viasine vivadi kaj morti

Eĉ vegetaĉi – vi putino el ŝtonoj...



Prago (el Vikipedio)

LA EVOLUO

BILDOJ EL NIA JUNECO
(2-a parto)



Leo De Cooman
tradukis el la flandra en esperanton,
el la verko de sia frato Emile De Cooman
laŭ rememoroj pri la familia historio

verkita de
Emile De Cooman



Kafujo kaj kaldrono

Kafopreparado

Kafo estis preparata per akvo boligita en kaldrono sur la hejtilo. En la kafujo pendis kafosaketo kudrita je ringo alĝustigata al la kafujo. La sako estis farita el kotona trikaĵo. Ju pli malnova estis la saketo, des pli bone la gusto de la kafo estis konservata. Oni rajtis nur elĵeti la kafrekrementojn, nepre ne lavi la saketon. Oni prenis du kulerojn da kafograjnoj el la kafoskatolo, metis ilin en la funelon de la kafomuelilo, pinĉis ĉi tiun inter la genuoj kaj muelis ilin turnante la krandon. Unue oni ĵetis manplenon da cikorio el



Kafmuelilo

alia ujo en la kafosaketon kaj aldonis la muelitajn kafograjnojn. Nun oni surverŝis iom da bolanta akvo por ŝveligi la muelaĵon kaj post iom da tempo oni plenigis la saketon per akvo. Kiam ĝi malpleniĝis, oni povis aldoni pli da akvo, ĝis la kafujo estis plena. Ĉe iuj kafujoj necesis atenti, ke la kafo ne superfluu tra la verŝotubo.

Kiam la ligno plene brulis, oni ĵetis ŝovelon da karbo sur ĝin kaj tuj rekovris la truon per la kaldrono. Intertempe la kafujo estis malplenigata en la lavujon de la kuirejo. La kafsaketo estis malplenigata en la karbujon. La kafrekremento estis kunbruligota.



Dormorobo

Dormorobo

Longa robo farita el blanka flanelo, kun longaj manikoj.

Vintre ĝi tenis nin agrable varmaj. Ni suprentiris la genuojn por iĝi agrable varma buleto. (La bildo montras fraton Liven sur stacio de Kalvaria Vojo pentrita de nia patro Jan De Cooman)

La plej junaj filoj, ankoraŭ ne vestitaj en la dormoĉambro, rajtis iom plu ripozi en la fotelo, varmtenante siajn suprentiritajn genuojn sub la dormorobo kaj atendante sian lavovicon post la manĝo. La plej aĝaj ja devis iri lernejen. Kontrolataj kaj helpataj de panjo, ili povis sin vesti en la kuirejo. Siajn vestojn ili jam je la antaŭa vespero estis metintaj sur seĝon anstataŭigante ilin per longa dormorobo.

Nia lavejo

Sur breto troviĝis kartona skatolo kun "Sunlight"-sapobrikoj apud granda papersako kun sodo, botelo da hipokloritakvo kaj saketo da blugilo apud aliaj iloj por la lavado. Sub ĝi, je la hokaro pendis raspilo por la sapo apud granda malmola broso por la maldelikataj kaj mola por la delikataj lavotaĵoj. Flanke de la pumpilo troviĝis ujeto kun briko da "Palmolive" por lavi nian vizaĝon kaj briko da "Sunlight" por niaj manoj, kiam ili estis tre malpuraj. La granda pumpilo disponigis pluvakvon el la dekmillitra cisterno, kiun mi vidis nur unu fojon malplena. Ĝi estis pumpilo kun granda flukvanto: kvar ektiroj havigis duonan sitelon da akvo. La muroj estis kovritaj de blankaj kaj bluaj kaheletoj ĝis la bluŝtona lavkuvo.

Apud la pumpilo pendis la mantuko kun, super ĝi, spegulo, en kiu mankis angulo. Sub

ĝi estis kombilujo kun fera kombilo por la hirtaj hararoj de la knaboj. Paĉjo kaj panjo havis ostan kombilon, sed tiu de paĉjo malhavis kelkajn dentojn, kiuj - laŭ aserto de panjo - derompiĝis alkroĉiĝinte en lia barbo. Malsupren venintaj sensuaj, nur en ŝtrumpoj, ni rapide surmetis niajn ŝuojn, ĉar la ŝtona planko estis malvarma.

La granduloj havis altajn ŝuojn, ĉar oni tiutempe asertis, ke ĉi tiuj estis pli taŭgaj por elformi la piedojn. Pleje ĝenis la malfacile nodeblaj laĉoj, por kiuj ni devis atendi helpon de panjo. Laŭvice ni iris en la lavejon por lavi nin ĉe kandellumo. Tie ni disponis komfortan bluŝtonan lavkuvon. Ni malsekigis angulon de la maldelikata kotona mantuko kaj ekfrotis sur brikon da "Cadum"- aŭ "Palmolive"-sapo por iom ŝaŭmigi ĝin kaj per ĝi froti nian vizaĝon, evitante la okulojn, ĉar la sapo tre pikus ilin. Ni ankoraŭfoje tiris la levilon de la pumpilo por akvumi angulon de la mantuko por viŝi nian vizaĝon per ĝi. Per la alia angulo ni sekfrotis ĝin. El la kombilujo ni prenis la feran kombilon por traplugi niajn sovaĝajn hararojn. Super ĝi pendis spegulo, kiu jam de kelkaj jaroj malhavis angulon. Ni ekrigardis nian hararon kaj tuj rapidis al la malgranda kuirejo, ĉar ni malsatis kaj cetere ne restis sufiĉe da tempo por malrapidi.

La matenmanĝo

Ĉiu havis sian fiksitan lokon ĉe la longa tablo, kiu staris en angulo de la malgranda kuirejo. Fiksita je la muro estis longa ligna benko. Tio evitis ŝovadon de seĝoj. Meze de la tablo tronis la kafujo, el kiu supreniris agrabla aromo ankoraŭ iom pli akriganta nian apetiton. Ĝi fiere staris tie sur fera submetaĵo por ne malpurigi la tablotukon.

Sur la tablo, sur alumina pleto atendis amaso da buterpanoj, kiujn panjo intertempe jam estis preparinta. La pano, kutime el la surplaca bakejo, tiutempe ankoraŭ estis tranĉata per granda pantranĉilo. Unue granda krucosigno estis farata per la pinto de la tranĉilo sur la tuta surfaco de la bonodora pano, nur post la krucosigno ĝi estis ektranĉata. Tiu tranĉilo estis farita el bajoneto el la unua mondmilito. Kun iom da butero sur la tranĉaĵo - margarino enmodiĝis multe pli poste - kaj tavolo da marmelado... la defio estis kiel eble plej rapide ĝin formanĝi.



Lavejo



Matenmanĝo

Pri la krustoj de freŝa pano foje estis disputoj. Tiam panjo detranĉis kelkajn pliajn flankojn, por ke ĉiu ricevu kruston. Kelkajn jarojn poste la pano estis tranĉata en la kelo, kiu troviĝis nur tri ŝtupojn sub la kuireja nivelo apud la koridoro. Tie estis tranĉmaŝino fiksita sur tablo. Por tranĉi la panon oni devis turni krandon.

Kiam ĉiu jam estis ĉe la tablo, oni faris religie krucosignon aŭ ion similan, ĉar la duonigitaj buterpanoj jam invitis nin. En bovon (kaftaso sen prenilo) estis verŝata la fluaĵo, kiu nomiĝis kafo. Por iuj estis aldonata iom da lakto el la aluminia laktokruĉeto. Kaj ni ekatakis la amason da buterpanoj, kiujn oni vidis rapide forfandiĝi. Unue ni trempis la buterpanon en la kafon kaj poste ni mordis... mordegis la buterpanon. Post kelkaj mordoj, ni tralavis la buŝon per kafo, kaj tenante la restaĵon de la buterpano en unu mano, ni jam ekprenis novan per la alia.



Aluminia taseto

La plej junaj knaboj, kiujn panjo ankoraŭ devis helpi, havis aluminian tason kun tenileto. Tiuj ne rompiĝis kaj la etuloj sukcesis pli bone teni ilin. Tiuj tasetoj estis pli taŭgaj ol la emajlitaj, kiuj povus vundi la langon, kiam la emajlo estis rompita. Verŝeto da kafo kun iom da lakto sufiĉis por trempi la buterpanon kaj poste elsuĉi kaj mordeti ĝin. Ili ankoraŭ uzis salivotukon por iom protekti ilin kontraŭ fuŝado.

Ne ĉiutage estis marmelado. Ŝanĝe kelkfoje estis spickuko kun aŭ sen sukeraĵoj; tiu de "Elodie" el la spicbutiketo estis la plej bongusta. Spickuko precipe aperis sur la tablo, kiam regis ĝenerala mallakso. Unu tranĉo kovris plenan pantranĉon kaj eĉ iom preterpasis ĝin. La marĝenon ni unue formordis antaŭ ol ekmanĝi la panon. Vintre ni ofte

ricevis mielon por defendi nin kontraŭ malvarmumoj. Vera frandaĵo estis freŝa blanka kazeo kun bruna sukero, sed tiu estis precipe por la posttagmeza manĝeto je la kvara horo. Ordinara fromaĝo estis havebla. Tiun oni aĉetis en speciala fromaĝbutiketo en strato Granda, kiam oni atendis vizitonton. En tiu butiketo oni povis trovi ja cent specojn da fromaĝo. Precipe onklo Ĵako, kiu estis inspektisto pri la fervoja linio Gento ("Geraardsbergen"), ŝatis tranĉeton da fromaĝo dum la posttagmeza manĝeto.

Foje oni variis per pirsiro. Sed pleje ni ŝatis la marmeladon, kiun panjo mem faris per riboj kaj ĉerizoj el nia ĝardeno.

Ni ne multe diris dum la manĝo, ĉar la regulo estis "Silento dum la manĝo". Nur frazeto, kia "Panjo, donu ankoraŭ iom da kafo, mi petas", estis permesata. Kaj, se la lastaj vortoj mankis, ĝi ŝajne estis ne aŭdata.

Post la plenigo de la stomakoj ni pensis pri la lernejo. Ni frotis la manojn per la kuireja mantuko por forigi la restaĵojn de la marmelado.

Post rapida kontrolo al la librosako ni povis foriri. La modo de lernejaj manĝetoj ankoraŭ ne estis inventita. En la librosako de la granduloj troviĝis kajero kaj ardezo kun grifelo; en tiu de la etuloj estis rezerva kalsono kiel antaŭzorgo okaze de akcidenteto.

En la lernejo

La plej fruaj pensoj, kiuj ankoraŭ kuŝas en mia memoro, temas pri lerneja tago en la infanklaseto de *Huneghem*. Tio verŝajne estis post la morto de nia Franĉjo. Li sekvis min en la vico kaj mortis pro konvulsio, dum panjo estis graveda pri nia *Liven*. La religiulinoj, kun kiuj panjo havis bonajn rilatojn, ofertis al ŝi, ke *Pol* kaj mi iru tien al ilia lernejo por iom malpezigi al ŝi la penon de la gravedeco post tiu malĝojiga fakto.



Supozeble mi iris dum duona jaro al *Huneghem*. Paĉjo veturigis nin tien per sia motorciklo. Ĝi estis *Douglas* el la milito (1914-1918).

Ne demandu al mi, kiel paĉjo sukcesis kun *Pol* kaj mi sur sia maŝino... sed ni alvenis. Ni restis nur dum la antaŭtagmezoj, se mia memoro ne perfidis min. Tio okazis en la periodo, kiam paĉjo instruis pri desegnado en *Karmelejo*.

Inter la ŝiraĵoj en mia memoro, mi ankoraŭ klare vidas unu fakton. Ĝi okazis al mi, mizeruleto. Estis io, kio okazas aŭ povas okazi al ĉiu infano. Dum iu antaŭtagmezo subite trafis min forta spasma, kaj la furzeton akompanis iom da... saŭco. Nu... Kion mi diras? "Iom", sed nun mi scias, ke ja estis duona sitelo da ĝi. Kaj ĝi ade venis. La alia infano, kiu sidis apud mi sur la benko, ŝoviĝis, kaj baldaŭ, pro la parfumo, forlasis la benkon. La religiulino, en sia plena uniformo kun la granda nigra ĉapo kaj blanka vizaĝovindo, venis en mia direkto kaj, post ekflaro, senbrue malaperis en la koridoro. For! Sed ŝian vizaĝon mi ankoraŭ ne forgesas. Tiu naŭzo pro la odoraĉo kaj tiu malakcepto kaj abomeno restas por ĉiam gravuritaj en mia memoro.

La aliaj infanoj ĉirkaŭ mi estis translokataj de alia religiulino, kiu estis pli patrineca, kaj ili estis sendataj al la ludejo per la sonorileto.

Kaj jen mi, infaneto du- aŭ trijara, restis tie tute sola en la akra senspiriga odoraĉo, kvazaŭ orfeto, spasme kuntiriĝinta en tiu varma feĉo, kiu iom post iom trovis elirejon tra miaj kruringoj pogute fluetante laŭ la sidvangetoj al miaj ŝtrumpoj kaj ŝuoj. Daŭradis tiuj spasmoj... daŭradis tiu terura odoraĉo...

Post eterna atendado subite aŭdiĝis forta frapo je la pordo, finfine aperis en la pordaperturo konata vizaĝo, tiu de mia paĉjo. Mi subite estiĝis tute senstreĉa ekvidante konatan personon, kaj la spasmoj tuj malpliĝis.

Sen komento li prenis min per siaj manoj ĉirkaŭ mia talio, rapidege levis min kaj kuris - min tenante for de li - al sia motorciklo, kiu staris antaŭ la pordego. Li sidigis min sur la benzinujon antaŭ li. La bruna saŭco ne ĉesis flui laŭlonge de miaj kruroj sur miajn ŝtrumpojn kaj ŝuojn. Mi ne plu scias, kiel li portis min hejmen, sed ja, ke jam pretis pelveto kun varma akvo, en kiun li enmetis min tute vestitan.

En neniuj momento de mia tuta vivo, mi estis tiel feliĉa pro la vido de mia panjo. Mi nur flustris "panjo!". Panjo lavis min. Mi kredas, ke ŝi lavis min almenaŭ du fojojn. Sed mi konvinkiĝas, ke ŝi metis pinĉilon sur sian nazon. En freŝa ĉemizo kaj pura dormorobo mi poste kuntiriĝinte ekdormis en ŝia sino. Feliĉe, ke paĉjo malhavis flarsenson. Sed li certe ne prononcis piaĵojn dum la purigado de sia *Douglas*-motorciklo.

Tiu historio estas la sola, kiun mi memoras el mia lernejana vivo en *Huneghem*. Nun mi dankas la ĉielon, ke tiam jam ekzistis telefono, kaj ke ni disponis tian aparaton. Sen telefono, kiel la monaĥinoj de *Huneghem* povus atingi mian patron? Ili ja estis enfermitaj monaĥinoj.

La ununura telefonaparato de la priorinejo troviĝis en la oficejo de la priorino, kiu persone kaj laŭ sia konscienco decidis, ĉu la afero ja estis sufiĉe grava por uzi ĝin. Sed en ĉi tiu okazo, ŝi uzis ĝin, ĉar mia patrino havis sufiĉe bonajn rilatojn kun *Huneghem*. Ŝi estis lerninta tie ĝis la deksejara aĝo, kaj ŝi finis tie la preparan mezgradan gimnazion por poste kompletigi la mezgradan studadon en *Eeklo* ĉe *Notre Dame du Sacré Coeur*.



Em De Cooman

Konsolanta patrino

Lingvo-uzado en la monaĥinejo

Tiutempe, en la flandriaj gimnazioj, la lernantoj estis devigataj paroli la francan. Eĉ dum la ludopaŭzoj, la uzo de la gepatra lingvo - la flandra, tio estas, la sudnederlanda - estis severe malpermesata kaj severege punata. Nia panjo poste, ankoraŭ regule, kun siaj idoj ĉemane, vizitadis siajn samtempulinojn, fratinon *Elizabeta* kaj fratinon *Edviĝe*. Ni do esceptokaze rajtis iri en la ĝardenon, dum panjo plu babilis kun la religiulinoj, en la franca, pri la vivo ekster la priorinejo.

En *Huneghem* estis *benediktaninoj* (enfermitaj monaĥinoj laŭ la reguloj de sankta Benedikto), kiuj neniam rajtis forlasi la priorinejon, escepte por la deviga voĉdonado (ekde 1921). Tiun okazon ili uzis por fari ekskurson tra la plej gravaj stratoj de la urbo. Tiaj monaĥinejaj reguloj poste iĝis multe pli malseveraj.

(daŭrigota) ★



Iam en Portugalio... (1)

Legendo pri Egas Moniz

Eduardo Novembro

— Via imperiestra moŝto!!!... Via imperiestra moŝto!!!...

Teren sin ĵetante antaŭ sia senjoro, subulo anhelanta pro ĵusa enkurado, ripetas:

— Via imperiestra moŝto!!!... Via imperiestra moŝto!!!...

Surtrone sidanta, Alfonso La 7-a, regnestro de Iberio, lin ordonas:

— Ĉesu kriegi... leviĝu... kaj klarigu tion, kio ĉi-hore vin venigas tiom ekscitita antaŭ mi!

— Ĉe la barbakano, via imperiestra moŝto!!... Ĉe la barbakano!!...

— Kio do ĉe la barbakano?!... — malspacenciĝas la monarko.

— Gento el la graflando *Portucale*!... Gento el...

— Ĉu armeo?... Soldatoj?...

— Ne... via imperiestra moŝto... Nur gento... Homoj el tiu graflando!...

— Sed kiuj estas tiuj homoj?... Ĉu armlprovizitaj?...

— Tute senarmaj homoj, via imperiestra moŝto... Tute senarmaj homoj... Nur unu maljunulo kun virino kaj infanoj!...

— Ĉu?!... Kion ili volas?...

— Ili petas aŭdiencon ĉe vi!

— Ĉu aŭdiencon? Kiacele? Kiuj ili estas?... Ĉu vi scias?...

— Jes... ja... Mi konas la maljunulon... Li estas Egas Moniz, la guvernisto de via kuzo Afonso Henriko el *Portucale*...

— Ĉu tiulo?!... Kiel eblas, ke li aŭdacas min spiti ĝuste ĉe mi... Ĉu ene de mia reĝlando?!... Kia malfeliĉulo!!!... Per sia vivo li pagos pro sia ofendo al mi!! Mi mem mortigos lin per miaj propraj manoj!!!... Parolo de Alfonso La 7-a, imperiestro de Iberio. Ĉi-foje li ne eskapos el mia furiozo... el mia justeco!... — li paŭzas, enspiras kaj roras ¹: — Tuj!!! Enirigu ilin tuj!!!

La monarko stariĝas por pli majeste kaj minaceme ricevi tiun nedezirindan vizitanton. Scivoleme li atendas, sed denove surpriziĝas ĉe la eniro de aro da homoj surmetantaj

¹ Bleki kiel aŭ kvazaŭ leono aŭ tigro.

laŭkondamnitajn vestaĵojn: maljunulo, virino kaj infanoj, ĉiu kun ĉirkaŭkole nodita dikŝnuro pendanta sur longa blanka tuniko. Feblaj kaj ekstreme lacigitaj ili ja aspektas.

— Jen mi plej humile je viaj piedoj, via imperiestra moŝto... — genuiĝas la maljunulo. — Ne nur mi, sed ankaŭ mia edzino kaj gefiloj. Nia vivo vin apartenas de nun... Vi ja rajtas viavole disponi pri mia vivo, same kiel pri tiuj de miaj familianoj, kiujn mi super ĉio senlime amas en ĉi tiu mondo. Ilin mi kondukis ĉi tien por kune kun mi pentofari pro mia rompo de honorvorto. Fidelan vasalecon kaj obeemon al via imperiestra moŝto ni ĉiuj agnoskas dum ni vivos.

— Nelonge vi atendos vian finon. Al mi estas neeble ŝpari vian vivon post tiel hontiga rompo de akordo far noblulo kiel vi. Post la okazaĵoj pri *Guimarães* via honorvorto fariĝis nekredinda... Ĝi nun valoras nenion... Nepardonebla misfaro via. Naive fidinte vin, mi levis sieĝon al tiu kastelo, kie vi ĉiuj estis enfermitaj kaj senpovaj, ne eltenante plu, baldaŭ venkotaj de mia militistaro. Pro via perfido mi perdis nedubeblan konkeron. Tion mi neniam pardonos al vi.

Sian furiozon Alfonso La 7-a elokvente elmontris per laŭtsonantaj paroloj. Respekt-eme aŭskultinte lin, Egas Moniz humiltone kuraĝas kontraŭmeti:

— Pardonu min, via imperiestra moŝto... Sed batalo tia iĝus simila al tiu de *Valdevez* — jam kromnomata Sangoverŝa Kamparo — sendecida kaj senvenka ambaŭflanke. Cetere multaj senkulpaj popolanoj tie rifuĝintaj pereus se tie ripetigis homa interfrapiĝo. Pli ol evitinda, tio iĝis evitenda.

— Mia kuzo Afonso Henriko, kiu ŝuldas al mi vasalecon, malrespektis vian fidgarantian promeson de lia vasaleco al mi, kaj invadis Galegion. Ankaŭ tie samegale loĝas senkulpaj popolanoj. Kial do li invadis Galegion?

— Ĝuste tra Galegio ni ĉiuj, mia edzino kaj miaj gefiloj kune kun mi — per larĝe ĉirkaŭanta brakgesto li almontras al siaj akompanantoj. — longe pilgrimis por vin renkonti kaj trankviligi. Tion ja videbligas niaj malpuraj polvokovritaj tunikoj, kaj niaj piedoj vundsangantaj pro tiom penega milvoja trairado... malsatantaj... soifantaj... via imperiestra moŝto!... Pri via kuzo, lia moŝta Afonso Henriko el *Portucale*, mi petas permeson atentigi vin, ke li estis ekde frua infaneco de mi mem edukata, kvazaŭ filo mia. De tiam fariĝis lia elkora vasalo sub mia responso, do neniel mi povus agi alimaniere vidalvide al tia cirkonstanco endanĝeriga kaj

por li kaj por ni ĉiuj... Cetere, ne-sondeblaj estas la projektoj de tiom entreprenema kaj sentima junulo, kiu plej supere revas pri starigo de forta kaj nevenkebla lando liberiĝonta el la maŭra regado; kaj kontraŭ tiuj komunaj malamikoj li jam multsukcese batalis.

— Sed en Galegio ne estas maŭroj...

— Nur pro tio, ke via kuzo ne lasas ilin tien transiri... Krome, jen mi kaj miaj familianoj genuiĝantaj antaŭ viaj piedoj por elaĉeti nin el tiu malbeno!

— Kiel vi aŭdacas eldiri tiajn jam ne kredindajn parolojn? Kaj kial do kredi je tiuj de viaj familianoj? Ĉu ili ne lernis de sia samsangulo la artifikon fari venenoviperajn promesojn? Sur ĉiuj vi pendas senhonoriga makulo de vortorompiĝo persekutonta vian posteularon, kiun vi dronigis en plej hontindan heredecon. Kiel do vi povos elaĉeti vin el tia malbeno?

— Per nia ekzekutigo far viaj justecamaj manoj, via imperiestra moŝto!...

Kun nekontrolata furiozo, Alfonso La 7-a el Iberio levas sian glavon — sangospura de multaj historiaj mortigoj — por ĝin faligi sur tiujn kapojn, kiuj surbrusten kliniĝas en plej humila rezignacio.

Tamen, neatendite, subita hezitemo trafas la monarkan menson:

"Ĉu mortigi tiun maljunulon pro lia senlima fideleco al sia senjoro? Ĉu ne respektinda vasalo tiu noblulo, kiu kuraĝas tiamaniere senhonorigi sin por protekti la mastron?... Plue, li tiom fervore kaj humile oferdonas sian vivon kaj tiun de siaj plej amatoj por pagi pekon de lojaleco!... Ĉu mi punos tiom noblan homan dignon?... Ĉu?..."

La mano de la monarko lante kaj milde ekdescendas laŭlonge de sia trunko por trankvile eningigi la reĝan glavegon. Sekve, al siaj subuloj, Alfonso La 7-a el Iberio ordonas:

— Zorge flegu tiujn vizitantojn, kaj pace eskortu ilin hejmen!...

Turnante la dorson, li kormalŝarĝas:

— Kia feliĉulo estas mia kuzo Afonso Henriko el la graflando portugala, *Portucale*, pro tiu grandvalora vasalo lia, la guvernisto Egas Moniz!...

★

www.lakaravelo.com



Statuo omaĝanta Esperanton, okaze de la 100-jariĝo (1987). Ĝi situas en Placeto Zamenhof, en la portugala urbo Barejro. La statuo estas dupeca. Rigardu en la posta paĝo la plej etan pecon.
(foto de JJS, 2010-10-04)



Barejro ***la portugala*** ***esperanto-urbo***

João José Santos

Surmura ŝildo ĉe la enirejo de Placeto Zamenhof.

(foto de JJS, 2010-10-04)

En Placeto Zamenhof okazis...

Antaŭ 23 jaroj, en la 12-a de aprilo 1987, la urbodomo de la *portugala esperanto-urbo* Barejro (pt.: Barreiro) inaŭguris statuan por celebri la 100-jariĝon de Internacia Lingvo Esperanto. La statuo restis tie en Placeto Zamenhof (pt.: Praceta Zamenhof), kiu estis inaŭgurita antaŭe en la 12-a de decembro 1981. Al la inaŭguro de la statuo, en 1987, aliris multaj membroj de Portugala Esperanto-Asocio, membroj de la Urbodomo de Barejro, invititoj, ĵurnalistoj kaj preterpasantoj. Entute tie estis ĉirkaŭ 500 homoj.

João Caeiro de Sousa, ne forgesebla ekzemplo de esperantisteco

La du eventoj ŝuldiĝas al la nelacebla esperantisto João Caeiro de Sousa, apogita de Portugala Esperanto-Asocio. Nun, post 23 jaroj, oni povas aserti, ke ĉi tiu statuo ankaŭ estiĝis omaĝo al la portugaj esperantistoj kiuj kunlaboris por ĝin starigi, precipe al João Caeiro. Dum longa tempo, ĉi tiu esperanto-laboristo insistis kaj persvadis ĉe la urbodomo por ke tiuj du esperanto-signoj efektiviĝu... ĝis la fina venko. Tiel ĉiam agis la esperantistoj, la veraj, tiuj kiuj ne frakasiĝas antaŭ la obstakloj.

Kompreneble, la laboro de João Caeiro ne elĉerpiĝis en multaj kontaktoj kun la urbodoma skabenaro. Li devis kontakti ankaŭ la artistojn, kiuj planis kaj realigis la dupecan statuon, kontakti muzikistaron por la inaŭguro, gazetojn, ktp. Por la inaŭguro de la statuo, la estraro de Portugala Esperanto-Asocio formis Jubilean Komitaton por apogi la laboron de João Caeiro. Tiam estis kontaktitaj pli ol 150 organizoj. Bedaŭrinde la amas-komunikiloj apenaŭ raportis la okazon, kvankam kelkaj el ili tie ĉeestis. Tamen, aperis kelkaj artikoloj en gazetoj.



La plej eta el la du pecoj konsistigantaj la statuon al Esperanto.
(foto de JJS, 2010-10-04)

Helder Madeira kapablis kompreni la valoron kaj signifon de esperanto

La urbodomo de Barejro ebligis al la portugaj esperantistoj agrablan renkontiĝon dum la semajnfino de la statua inaŭguro. La dupecan statuon kaj la dusemajnan renkontiĝon la urbodomo ĝentile pagis. Tiam estris Urbodomon de Barejro la prezidanto Helder Madeira kaj la kultura skabeno estis s-ino Rosalina Maria. Aliaj gravaj nomoj menciindas pro ilia memdediĉo al tiu evento: Tomás Rocha da Costa, Correia Coimbra, Joaquim Calado, Manuel Firmo, Alberto Pedro da Silva, Fernando Sylvan, inter aliaj. El ĉiuj, flanke de la PEA-organizado evidentiĝas la plej granda memdediĉo de Inĝeniero Franco Simões. Plejparto el tiuj homoj jam forpasis. La paĝoj de la PEA-revuo *Nia Bulteno* (n-ro 32-a, de majo-junio 1987, paĝoj 5-8), el kie estas plukita plej granda parto el ĉi tiuj historiaj informoj, finiĝas per instrua frazo de João Caeiro de Sousa: "Neniu el ni laciĝis".

En NB-33 (paĝoj 5-8), Inĝ. Franco Simões esprimis senteman dankon de Portugala Esperanto-Asocio al la ĝentila donaco de Urbodomo de Barejro. Tiu artikolo estas dulingva, portugala kaj esperanta.

La aŭtoro de ĉi tiuj linioj, kiu tiam estis esperantisto de antaŭ ĉirkaŭ du jaroj, en la 12-a de aprilo 1987 estis inter la PEA-membroj, kiuj inaŭguris la esperanto-statuon en Barejro.

★

Barejro

pluestas la plej grava esperanto-centro en Portugalio

João José Santos



João José Santos prelegas por 56 homoj. Multaj el ili estas esperanto-lernantoj en *Universitato de la Tria Aĝo de Barejro (UTIB)*. Ĉe la ĉeftablo sidas la organizinto de la evento, la direktoro de UTIB s-ro Luís Cunha. (foto de Luís Duarte, 2010-10-04)



40 homoj lernas esperanton en UTIB

Nuntempe en Barejro, oni instruas kaj lernas esperanton en *Universitato de la Tria Aĝo de Barejro (UTIB)*. Pasintan lernjaron, pli ol 20 gelernantoj ĉeestis la esperanto-lecionojn en UTIB. En la lernjaro nun komenciĝanta la enskribiĝoj estas preskaŭ 40. Ĉi tiu nova elano por esperanto en Barejro ŝuldiĝas al unu el la direktoroj de UTIB, kiu nun lernas esperanton: s-ro Luís Cunha. Li invitis du malnovajn kaj maljunajn esperantistojn por instrui esperanton en tiu universitato: s-ro Luís Duarte kaj s-ro Artur Oliveira.

Luís Duarte, nun 84-jaraĝa, lernis esperanton ne denaske, sed lia patro jam estis esperantisto. Ĉu nun oni ekkomprenas, kial oni asertas, ke Barejro estas *La Portugala Esperanto-Urbo*? Ĉar neniu alia portugala urbo havas tiel riĉan esperanto-historion kiel Barejro.

Prelego pri esperanto en Barejro

En la vespero de la 4-a de oktobro 2010, okazis prelego pri esperanto en ĉi tiu urbo, kiu situas ĉirkaŭaĝe de Lisbono, trans la Taĵo. Ĝi estis organizita de UTIB. Tiucele, por prelegado pri esperanto, la organizinto Luís Cunha invitis la instruiston João José Santos.



João José Santos (centre) interparolas kun la organizinto Luís Cunha kaj kun D-ino Ana Cristina Silva, stabano pri Edukado de Urbodomo de Barejro.
(foto de Luís Duarte, 2010-10-04)

Tie estis 56 homoj, kiuj atente aŭskultis argumentojn favorajn al esperanto, kaj ili starigis interesajn demandojn. Krom multaj esperanto-komencantoj, ankaŭ estis tie la esperantistoj Luís Duarte, Artur Oliveira kaj Miguel Boieiro. S-ro Luís Cunha kaj s-ro Edgar Ferreira reprezentis la universitaton, kaj d-ino Ana Cristina Silva reprezentis la urbodomon. Vendiĝis kvin lernolibroj *Esperanto em 30 horas*, kio estas indiko pri la intereso pri esperanto. Unu el la ĉeestintoj estas la konata ital-portugala aktorino s-ino Io Apoloni, kiu ankaŭ vige faris interesan demandon pri la spaco jam okupata de la angla lingvo en la mondo.

Esperantisto ne havas aĝon

La Karavelo donacis la unuajn 19 revuojn por la biblioteko de UTIB. La esperanto-afero ĉiam progresas, kiam oni faras ion por tio. Barejro, portugala urbo kie tradicie oni umas pri esperanto, plu portas la verdan torĉon. Parafrazante João Caeiro de Sousa: *Neniu el ni laciĝis, kvankam du homoj jam pasis la 80-jariĝon.*



Luís Duarte senaŭkorese fuĝas de la fotilaj intencoj.
(foto de JJS, 2010-10-04)





Roger Gotardi
tradukis

La kukolhorloĝo

de Arturo Azevedo

Ne estis rimedo sukcesi, ke Roberto restu eĉ unu nokton hejme, en kompanio kun sia edzino: li nepre devis eliri post la vespermanĝo, kaj kutime li revenis nur je la deka, aŭ je la dek-unua horo, kaj kelkfoje eĉ post la noktomezo.

La edzino, kiu estis sanktulino, kiel ĉiuj inoj de edzoj noktovagaj, ne plendadis, ne petadis de Roberto, ke li irigu ŝin kune, ne demandadis al li eĉ kien li iris, kiam ŝi vidis lin alveni iom pli malfrue. Ĉi tio maloftege okazis, ĉar kiam la manĝoĉambra kukolhorloĝo batis la dekan horon, ŝi jam, kompatindeta!, estis falinta en profundan dormon.

* * *

La manĝoĉambra kukolhorloĝo estis unu el la plej kuriozaj, kiuj restis en Rio-de-Ĵanejro de la tempo, kiam ili estis modo: ĝi antaŭe apartenis al la avino de Roberto, kaj li por neniom ajn da mono senigus sin je tiel kara kaj valora relikvo familia, kiu samtempe estis sopirporta rememoraĵo de l' infanaĝo.

La horojn donis mekanika birdo. Ĝi eliris el sia kaĝo, malfermis la bekon kaj malrapide ekkantis: "Kuku, kuku, kuku...". Roberto, kiam infano, imitis ĝin ĝis tia simileco, ke li trompis la familianojn.

* * *

Iun nokton iris nia heroo al Nacia Kazino, kaj permesis al si esti tentata de amiko, kiu invitis lin noktomanĝi kun si kaj kun du

kantistinoj, unu laŭmoda kaj alia ekstravaganca.

Post la noktomanĝo, la amiko foriris kun unu el ili al Kitero, vulgare nomata Kopakabano¹, kaj Roberto estis devigata akompani la alian al pensiono ĉe Plaĝo Ruselo.

Kiam li konsciiĝis pri la tempo, estis preskaŭ la kvara nokte! Ho, diable!, tiel malfrue li neniam eniris en la hejmon!

Li eniĝis en tilburon², kiu oportune aperis al li, kaj li forrapidis hejmen. Li malfermis la pordon plej singardeme, kaj antaŭ ol eksupreniri la ŝtuparon, li deprenis la botojn, por ne bruigi.

Lia dormoĉambro – lia kaj de lia edzino – estis apud la manĝoĉambro: estis necese trairi ĉi tiun por eniri ĝin.

Li trairis sed, ĉar estis malhele, li tuŝegis seĝon, kiu tondre falis.

Tuj Roberto aŭdis la sinjorinon moviĝadi en la lito kaj li diris al si:

- Ve! Jen mi vekis mian edzinon!

Ŝi demandis:

- Ĉu estas vi, Roberto?

- Jes, estas mi, sinnjo.

Kaj la edzo aldiris al si:

- Tre bone, ŝi ne scias, kioma horo estas.

Sed tiam la kukolo elkaĝiĝis kaj malrapide eklekis: "Kuku... kuku... kuku... kuku..."

- Mi estas perdita! – pensis Roberto.

Sed luma ideo subite trasagis lin en la cerbo. Ĝuste tiam la birdo kantis kvarafoje kaj ĝi revenis en la kaĝon. Tiam li daŭrigis: "Kuku... kuku... kuku..." ĝis kiam li kompletigis dek-unu kukuojn.

Roberto mem ne sciis, ke li ankoraŭ imitas la birdon tiel perfekte.

- Dek-unua horo – diris li post la dek-unua kukuo. – Mi supozis, ke estas pli frue!

Tiam li komencis senvestiĝi.

La sankta sinjorino turnis sin aliflanken kaj endormiĝis denove. Ŝi tute ne rimarkis la aferon.

★

¹ Verŝajne hotelo aŭ simila gastejo, uzata kiel amorejo. (RG)

² Malpeza duloka kabrioletto (JJS).



Djalma Pessata

UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1920

12-a Universala Kongreso de Esperanto

(de 1916 ĝis 1919 ne okazis kongresoj pro la mondmilito)



Loko: Hago, Nederlando

Dato: de la 8-a ĝis la 14-a de aŭgusto

Aliĝintoj: 408

Tiu ĉi estis la unua universala kongreso de Esperanto post la unua mondmilito. Maldekstre, la kunvenejo de la kongreso, Kavalira Salonego.

Johannes Rijk Gerardus Isbrucker estis la prezidanto de la 12-a UK. Li estis membro de LK kaj de Akademio, kaj fine ĝia prezidanto. Laŭ lia iniciato estis komencita listo de la oficialaj vortoj, kun precizigo de iliaj oficialaj sencoj kaj de ilia logika karaktero.

Ĉu vi scias?

★ En la 12-a UK okazis ekskurso al Lejden, en la 13-a de aŭgusto.

★ En la Reĝa Teatro estis prezentitaj du teatraĵoj de Jo Pabst: Juĝa Kunsido en 1813 kaj Muzikvespero en 1813.

★ Dum la 12-a UK oni iniciatis la fondon de nova internacia organizo, nomata Internacio Katolika (IKa), kiu ne estis ekskluzive Esperantista, sed kiu uzis Esperanton kiel sian internacian lingvon. IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) estis absorbita en Ika. Pro la instigo de la nederlandanoj Smulders kaj Schendeler, en 1921 IKUE reprenis sian sendependecon kaj reaperigis la gazeton "Espero Katolika".



Ekskurso al Lejden

UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1921

13-a Universala Kongreso de Esperanto

ESPERANTO
★ TRIUMFONTO ★

N-ro 17 ★ 29. Jan. 1921 Ĵurnalo internacia, universale, sendependa
elstaro de Tiu lingvo, kio-tema (kurio) ★ Eliras semajne. ★

**1800 infanoj en unu urbo lernas
la lingvon Esperanto.**

**Ĉeĥoslovaka Komerc-Ministerio donas Subvenciojn de 10000 Kronoj
al la Dektria Kongreso de Esperanto.**

La Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Prago, la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto, estos la plej granda kongreso de Esperanto, kiu ĝis nun estis organizita. Ĝi okazos en la Ĉeĥoslovaka Komerc-Ministerio, kiu donos subvenciojn de 10000 Kronoj al la Dektria Kongreso de Esperanto.

La Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Prago, la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto, estos la plej granda kongreso de Esperanto, kiu ĝis nun estis organizita. Ĝi okazos en la Ĉeĥoslovaka Komerc-Ministerio, kiu donos subvenciojn de 10000 Kronoj al la Dektria Kongreso de Esperanto.

La Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Prago, la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto, estos la plej granda kongreso de Esperanto, kiu ĝis nun estis organizita. Ĝi okazos en la Ĉeĥoslovaka Komerc-Ministerio, kiu donos subvenciojn de 10000 Kronoj al la Dektria Kongreso de Esperanto.

Ĉefa ĵurnalo - 1921

Loko: Prago, Ĉeĥoslovakio

Dato: de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto

Aliĝintoj: 2561

La 13-a UK havis grandan apogon de la Ĉeĥoslovaka Ministerio pri Komerc, kiu donis subvenciojn de 10.000 kronoj al la 13-a Universala Kongreso de Esperanto.

La 13-an UK ĉeestis Klara Silbernig, la edzino de Zamenhof, kiu jam estis mortinta.


Teatraĵoj Prezentitaj

- ★ *Nokto en Karlav Tyn*, de Jaroslav Vrchlicky
- ★ *La Glavo de Damokles*, de Gustav zu Pulitz
- ★ *La Paĝo de l' reĝino*, de Jen Heltai kaj Emil Makai

La Fondiĝo de SAT

Eugenio Lanti (1879-1947) estis la kunfondinto kaj ĉefa gvidanto de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Tiu asocio aperis dum la 13-a UK. Ĝi tiam nomiĝis "Liberiga Stelo", kaj ĝi havis sian kongreson de la 1-a ĝis la 3-a de aŭgusto 1921 en Prago, ekster la oficiala programo de la 13-a UK. En tiu SAT-kongreso estis 79 partoprenantoj el 15 landoj sub la honora prezido de Henri Barbusse. En ĉi tiu kongreso "Liberiga Stelo" alinomiĝis al "Sennacieca Asocio Tutmonda".

SAT celas praktikan mondiskalan uzon de Esperanto por celoj de socia progreso kaj emancipado de laboristaro. (Fonto: Historio de Esperanto – Aleksander Korĵenkov).



Eugenio Lanti



Afiŝo de la 14-a UK

UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1922

14-a Universala Kongreso de Esperanto

Loko: Helsinko, Finnlando

Dato: de la 6-a ĝis la 12-a de aŭgusto

Aliĝintoj: 850

Kvankam la afiŝo montras, ke la 14-a UK okazis de la 6-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1922, tamen la kongresa libro montras, ke la evento komenciĝis en la 8-a kaj finiĝis en la 16-a de aŭgusto de tiu jaro.


Interesa afero: la kongresa libro plurloke ripetas la konsilon «Estante en la urbo vi ĉiam povas telefoni al la Akceptejo vokante nur "Esperanto"». La unua aŭtomata telefona centralo estis instalita en la urbo en 1922, ĝuste en la kongresa jaro, kaj en 1929 la tuta urbo estis jam aŭtomatigita. (Fonto: Harri Laine, Ipernity)

En la 14-a UK estis prezentitaj du **teatraĵoj** de la plej granda finna dramverkisto ALEKSIS KIVI (1834-1872):

★ *La Fianĉiĝo* ★ *Kalevala*

La Kontrakto de Helsinko

La kontrakto starigis novan organizadon inter UEA, la naciaj societoj (landaj asocioj), la Lingva Komitato kaj la Universalaj Kongresoj. Supera organo de la esperantistoj fariĝis "Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado". La ĉefa celo de la kontrakto estis unuigi la Esperanto-asociojn en komuna forumo.



Aleksis Kivi



(de la paĝo 24)

Takto de marŝo

1. Ja plej bon - gus - tas la pi - la - fo kun le - go - moj, gu - stu - mu
 ĝin - plej no - blas la a - spir'! Do ĝo - ju, ĉar pi - la - fon po - vas ĉi - uj
 ho - moj pre - pa - ri. Ko - men - ci - ĝu jam ku - ir'! Ke bo - ne
 ple - nu - mi - ĝu la de - zir', vi zor - gu pri ĉe - fa - ĵoj ti - uj kaj pri
 kro - moj! 2. Ba - na - non // (10.) pa - ĝon!»





Pilafo kun legomoj rusa recepto



Irina Mironova
recepto, poemo, muziko



Ingrediencoj

2 bananoj
2 glasoj da rizo
1 cepo
3 karotoj
2 pomoj

1 glaso da sekvinberoj
1 glaso da sekaj abrikotoj
1 glaso da oleo
4 glasoj da akvo



Preparado

Mezuru ĉiujn ingrediencojn laŭ samgranda mezurglaso. Lavu, senŝeligu kaj kubetigu la bananojn, cepon, karotojn kaj pomojn. Dispecigu la grandajn abrikotojn.

En poto taŭga por rekta flamo kaj bakforno, metu duonon da oleo kaj la cepajn kaj karotajn pecojn. Fritu mallonge, ĝis la pecoj estas karamelecaj - ne tro molaj.

Demetu la poton de sur la fajro kaj aldonu tavolon de unu el la haketitaj bananoj. Sekvu tion per tavolo de glaso da rizo. Kovru tion per la resto de la fruktoj, tiam sternu la duan glason da rizo super tio. Enverŝu 4 glasojn da akvo kaj la restantan oleon kaj kovru la poton. Metu en mezvarman bakfornon dum horo.

Pilafa Poemo

Ja plej bongustas la pilafo kun legomoj,
Gustumi ĝin – plej noblas la aspir'!
Do ĝoju, ĉar pilafon povas ĉiuj homoj
prepari. Komenciĝu jam kuir'!
Ke bone plenumiĝu la dezir',
Vi zorgu pri ĉefaĵoj tuj kaj pri kromoj!

Bananojn unu-du bezonos vi, du glasojn,
Da blanka rizo, cepon por prepar'.
Karotojn tri aĉetu vi sen embaraso,
Necesas krome de la pomoj par'.
Pri la procez' jam estas plena klar'
Do baldaŭ estos antaŭ ni bongusta maso.

Po unu glaso prenu ni da sekvinberoj
Kaj sekaj abrikotoj, ankaŭ ni
Oleon (plena glaso) prenu, ja aperoj
De ĝi egalas plena harmoni'.
Jen estas preta manĝproduktuni'.
Por la pilafa kolektiĝis ties eroj.

Ni ĉion lavas, senŝeligas bezonaton
Kaj dispecigas (ĉion krom la riz'!).
Bananon metas ni aparte (bonan staton
Ĝi havu por ne estu granda kriz'),
Karoton kun la cepo. Kaj Pariz'
Pro ĝojo tuj surmetos ĉapon kaj kravaton.

Al poto verŝu duonglason da oleo
Kaj metu ni karoton kun la cep'.
Kun varma forno estos tuj kuira kreo,
Al kiu ne malhelpos laŭta rep',
Vizitoj pensaj al kazaĥa step',
Promenoj virtualaj sur la parkaleo.

Sur kuirita cepo kun karoto metu
Tavolon da bananoj (unu nur!).
Ĝin sekvas riztavolo (unu glaso). Sed tuj
Ne kovru per kovrilo, ĉar la spur'
Legoma-frukta ne lasitas. Tur'
Kuiru konstruitos daŭre. Mi vin petu

Legomojn kaj la fruktojn preni kaj elŝuti
Sur riztavolon, poste por belec'
La duan glason de la rizo – same. Muti
Ne devas vi. Vi kantu! Tiu spec'
De ago ĉiam helpas. Kaj parenc'
Aŭ homo fremda pretos vin kontentsaluti.

Nu, preskaŭ ĉion ni preparis. Nur la akvon
Surverŝu ni (kvar glasoj) al pilaf',
Kaj tion, kio restis de oleo. Ravon
Ricevos vi jam baldaŭ. Eĉ la kaf'
Ne donos tiom da plezur'. La ŝaf'
Pro la pilaf' plu vivos, dankas ĝi la savon.

Nun kovru ni la poton per kovrilo bela
(Ne nepre tia – vi elektu mem!).
En la bakfornon varman por la horo (nek la
Minuto, nek la tago!), ja ŝparem'
Utilas ĉiam, kiel bona krem'
En hejmkuiro... Ni atendas revon helan!

Post horo povos manĝi ni bongustan manĝon,
Regali ĉiujn. «Manĝu vi, Ivan'!»
«Ĉu pli bongustas la pilaf', ol simpla pan', Ĝon?»
«Ho, certe jes! Voĉdonas mia man'
Por la pilaf'. Eĉ estas bela plan'
Kun la kuirrecept' interretigi paĝon!»

(daŭras en la paĝo 23)